

Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 575/90-1, 1982 aprilo 15 kaj 17.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-90/SRI-1982-90-1-575-Claude-kaj-Andree-GACOND-Kiu-estas-kiu-en-scienco-kaj-tekniko.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dediĉe al la 75-a Jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista aperis pasintjare jarlibro titolita KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO. Ĝia redaktoro estas svisa inĝeniero vivanta en Okcidenta Germanio. Li nomiĝas Christian Darbellay.

A.- La leginda antaŭparolo de la belga biologo Win De Smet rakontas pri la ideo mem de la libro. Ni citu el ĝi :

Cl.- "Per la apero de tiu ĉi libro realiĝas ideo, kiu jam de multaj jaroj ĝermas, sed kiu antaŭe neniam atingis la efektivigon.

A.- "En-la preskaŭ centjara ekzisto de la Internacia Lingvo Esperanto, en multaj sektoroj de la homa kulturo demarŝoj jam estas faritaj, jen kaj jen kun iom da sukceso. Sed la aplikado de tiu lingvo en scienco kaj tekniko grave postrestis, kvankam ĝuste sur tiu kampo, internacia facila lingvo estas ege bezonata, kaj kvankam jam de la jaro 1906 ekzistas asocioj, kiuj alstrebas tiun aplikadon.

Cl.- Certe, en la mondo ekzistas miloj da sciencistoj, kiuj jam en sia vivo lernis Esperanton. Certe ankaŭ estas aliaj dekmiloj, kiuj sen granda peno kapablas asimili la ĉefajn sciojn pri tiu lingvo en mallonga tempo. Sed la nombro de la sciencistoj, kiuj vere scipovas la lingvon, limiĝas nur al kelkaj centoj. Kaj eĉ malpli granda estas la nombro de tiuj, kiuj aktivas en la Esperanto-movado. Kaj la nombro de tiuj, kiuj klare konigas sin pri tio, certe ne estas impona.

A.- "Kiam mi levis tiun ĉi problemon dum la jarkunveno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista en 1964 - daŭrigas Win De Smet - naskiĝis la ideo ellabori superrigardon pri la Esperanto-sciaj sciencistoj. En la sekvantaj jaroj konsistiĝis sliparo kaj ĝi kreskis al kelkaj centoj da slipoj. Sed poste, la tempo mankis por daŭrigi la laboron, kaj krome kelkaj cirkonstancoj ne estis favoraj. Montriĝis la neceso, ke iu alia transprenu tiun laboron, des pli ĉar intertempe pli kaj pli sentiĝis la bezono pri pli klara superrigardo de la sciencistoj, kies nombro, cetere, konstante kreskis.

Cl.- Feliĉe en 1979 prezentis sin la persono, kiu transprenus la laboron: juna svisa inĝeniero, laboranta en Germanio, Christian Darbellay. Li tuj energie dediĉis sin al la laboro, kolektis novajn informojn, elpaŝis al novaj metodoj. Kaj jen nun la rezulto: libreto, kiu estas unua provo por informi pri aro el Esperanto-sciaj sciencistoj.

A.- Win De Smet konkludas dirante: Ni esperu, ke baldaŭ sekvos pliaj eldonoj, ĉiam pli kompletaj, kun pli da nomoj kaj pli da informoj. Kaj ni krome esperu, ke la enhavo de tiu ĉi libro stimulos al pli ĝenerala kontakto inter kolegoj kaj al pli signifa rolo de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Cl. — Kun li ni diras: Gratulojn al la verkanto. Bonan farton al la unua eldono!

A.- Kiel sin prezentas tiu ĉi unua eldono?

Cl.- Unue ni diru, ke tiu libro ducentsepdekkvinpaĝa alportas tre detalajn sciigojn pri pli ol 200 sciencistoj kaj teknikistoj, informante pri iliaj nomo, adreso, naskiĝjaro, fakoj kaj titoloj kaj publikaĵoj. Foto konkretigas tiun ĉi kontakton kun homoj, kiuj ofte ludas rolon en la esperanto-vivo. Ni ne dubas, ke tia libro havas grandan utilecon: ĝi certe faciligos la kontaktojn inter la fakuloj, permesas al tiuj, kiuj ilin frekventas, akiri ideon pri ilia aktiveco. Por la bibliotekistoj ĝi estos minejo da ofte nefacile troveblaj biografiaj kaj bibliografiaj informoj.

A.- Indeksoj faciligas la konsultadon de la libro. Ili proponas laŭfakan kaj laŭlandan listigojn. Sekvas fine laŭfaka listigo de preskaŭ 1500 sciencistoj, por kiuj la redaktoroj de la libro ne povis ricevi informojn.

Cl.- "Tiu ĉi libro devas esti konsiderata kiel proveldono, de prototipo de KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO, skribas averte la aŭtoro-kompilanto Christian Darbellay, kiu tiel priskribas sian laboron. Ni citas lin:

A.- "Ni limiĝis al 200 personoj pro tempaj kaŭzoj: se mi estus atendinta la respondon de ĉiu alskribito, verŝajne pasus ankoraŭ multa tempo antaŭ la finredaktado. Sed certe sekvas regulaj eldonoj ĝisdatigitaj kaj pliampleksigitaj.

Cl.- Christian Darbellay atentigas nin, ke la kompilanto ne respondecas pri la entenitaj informoj: li nur redonas tiujn, kiujn li ricevis de la koncernaj personoj.

A.- Ĉar temas pri prototipo, kiu estas perfektigebla kaj perfektigenda, li atendas kritikojn kaj konsilojn.

Cl.- Trafoliante la libron ni konstatas, ke la kvar landoj, kiuj liveras la plej grandan nombron da esperanto-sciaj sciencistoj estas laŭvice Britio: 23, Japanio kaj Hungario, po 21, Germanio: 18. Sekvas Francio kaj Pollando kun po 16. Svislandon reprezentas nur 2 sciencistoj, d-ro August Braun, metafizikisto kiu estas konata en la esperanto-movado kiel prezidanto de Kultura Centro Esperantista, kaj Tazio Carlevaro, kiu estas konata kiel psikiatro kaj interlingvisto kaj en esperantujo, kiel prezidanto de la interlingvistika arkivejo : Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI).

A.- En Svislando ekzistas kelkaj aliaj sciencistoj kaj teknikistoj esperanto-sciaj, kaj verŝajne estas same en la plimulto de la landoj. Ni esperas, ke tiu ĉi unua eldono de KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO instigos ilin respondi al la demandaro, kiun ili refoje ricevos. Kaj ni ankaŭ esperas, ke la fakuloj, kies nomoj aperis en la eldono 1981, atente kompletigos la informojn, kiuj ilin koncernas, aldonante la liston de siaj novaj publikaĵoj. Tiel la libro fariĝos pli kaj pli utila, kaj novaj eldonoj nepre posedindaj por tiuj, kiuj havas sciencan, redaktoran aŭ bibliotekistan aktivecon.

Cl.- Sed, novaj eldonoj aperos, nur se la unua bone vendiĝos. Tial ni kuraĝigas ĉiujn jam interesiĝi pri tiu eldono 1981, ĉar jam en sia nuna konsisto, ĝi alportas abundan rikolton da scioj.

A.- Estus dezirinde, ke en aliaj fakoj similaj jarlibroj eldoniĝu. Kaj ke pri la mortintaj esperanto-aktivuloj oni ankaŭ povu trovi fidindajn informojn. Kiuj kompilos tiujn ĉi informilojn?

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond parolis pri la libro KIU ESTAS KIU EN SCIENCO KAJ TEKNIKO de Christian Darbellay. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2014*